

Se la proceso de interfero (per utiligo de sun-radioj) daŭros sufiĉe longe, do en la retorto akumuliĝos granda kvanto da KE.

Jen ni havas akumulatoron malgrandan, pezetan, tamen treege kapacitan. Aviadiloj, ŝipoj, aŭtoj, busoj... ne plu bezonos brulaĵon (benzinon k.s.). Unu retorteto kun KE sufiĉos por jaroj. Kaj la urba aero estos pura pri haladza gaso k.a. venenaj substancoj. Realiĝos revo de Leonardo da Vinĉi pri la homa flug-kapablo, simile al la flugpovo de la birdoj.

Restas ankoraŭ problemo, kiel eligi KE el retorto kaj transformi ĝin en aplikeblan formon de energio. Nu, ĉi tio estas nur teknika tasko.

Ke principe ĉi tio eblas atestas tio: kiam mankas "kaptilo" la radioj "renaskiĝas" post trapaso de "nigra truo". Do, KE povas retroformiĝi en la originan energion. Kaj plue transformi ĝin en la elektro-energiecon estas ordinara teknika tasko.

Do principe ankaŭ "eligproblemo" solveblas.

Kiu solvos la paradokson? Aŭ kiu klarigos fizikan esencon de KE?

Z. Arbo

"MAN-LIBRO PRI TRANSPORTO DE FLUIDAĴOJ"  
de Jacques MANCEAU (Saintes-Francio)

Inĝenieroj kaj teknikistoj silente laboras por ke Esperanto fariĝu utiligebla en sciencoj kaj tekniko, sed iliaj verkoj plejofte restas nekonataj de la interesatoj. Tial, mi hodiaŭ prezentas la plej rimarkindan el tiaj verkoj aperintaj en la 1973.

Temas pri la "Man-libro pri transporto de fluidaĵoj", kiu estas bona reproduktaĵo per fotokopia sistemo Kseros, kaj entenas 251 paĝojn en formato 15 x 21 cm. En la teksto abundas teknikaj informoj, teoriaj kaj praktikaj, tuj utiligeblaj fare de divers-branĉaj teknikistoj.

Krome, multaj ilustraĵoj aperas en la libro, ekzemple:

- *bildoj* pri ĉiuj valvo-tipoj, inkluzive de la retro-fermaj kaj sekurigaj, de la injektoroj kaj eljektoroj, de la prem-reduktiloj aŭ multobligiloj, de la rapidec-varigiloj ktp...
- *diagramoj* pri prem-perdo kaj varm-perdo en tuboj, valvoj kaj rezervujoj pri ŝarĝo-perdo en vapor-tuboj, pri elekto de transmisiiloj ktp...
- *tabeloj* pri proprecoj de gasoj, de alojoj, de plastaĵoj; pri elekto de izoliloj, pri kalkuloj pri tuboj ktp...
- *formuloj* por kalkuloj pri pumpiloj kaj kompresoroj (piŝtaj kaj centrifugaj), pri ventoliloj, tuboj ktp...

Entute la libro estas verko rekomendinda ne nur al tiuj, kiuj interesiĝas pri hidrodinamiko kaj pri la funkciado de la koncernaj aparatoj kaj maŝinoj, sed ankaŭ al profesiuloj kiuj tiel perfektiĝas kaj eĉ iom lernos dank'al bone verkita Esperanto.

Alia parte, pro la alta-teknika karaktero de ĉi tiu libro, ne estus superflue montri ĝin en ekspozicioj inter la plej bonaj esperantaĵoj.

La libro estas mendebla ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando (20,60 guldenoj).

Recenzas: André Blondeaux (Francio)